

eLIBRO

Sigvard Feldbaum

Juda saço

I N K O

JUDA SAĜO

Elektis kaj tradukis en la svedan:

Sigvard Feldbaum

Esperantigis: Leif Nordenstorm

© *Sigvard Feldbaum, Leif Nordenstorm*

Ilustraĵoj: Laŭ siluetaj tondaĵoj

fare de la israela artisto Yehoshua Grossbard.

Esperantigo de hebreaĵoj: Mark Steinberg

Lingve kontrolis: Literatura komitato
de S.A.T. kaj Sten Öfors



La presita eldono aperis ĉe

Dana Esperanto-Eldonejo, Aarhus, 1980,

ISBN 87-85020-99-0

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-193-3

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

APRILIO 2003

Antaŭskribo

Mi esperas, ke tiu ĉi kolekto da judaj saĝo—vortoj donos ne nur ĝojon, sed ankaŭ komprenon pri la mondo de la judoj.

La elektaĵo venas el ĉirkaŭ 2000 jaroj kaj estas kompreneble persona. La unua parto tamen provas speguli la opiniojn, kiujn la judoj havas pri si mem kaj la Instruo (La Torao).

La traduko venis el la jebra, jida, angla kaj germana. La penado ĉiam estis transigi la spiritan sencan al facile komprenebla sveda.

Mi indikis la aŭtoron aŭ la fonton de la citaĵoj kie eblis, sed konscias pri la mankoj.

Agrablan legadon,

Stockholm en Septembro 1976

/elul 5736

Sigvard Feldbaum

En 1980 aperis la unua Esperanta eldono de *Juda Saĝo*, libro je kiu mi profunde enamiĝis kiel dekkelkjarulo, kiam mi ankoraŭ havis la nomon Leif Gunnar Karlsson. Nun mi nomiĝas Leif Nordenstorm, sed mi ankoraŭ aprezas la enhavon de la libro.

La papera eldono jam delonge elĉerpiĝis. Tial mi dankas al Sigvard Feldbaum por la permeso aperigi la libron elektronike, kaj al Franko Luin por lia prececo aperigi ĝin. La traduko estas iomete reviziita.

Boden en Februaro 2003

Leif Nordenstorm

LA JUDECO KAJ LA INSTRUO

Kion vi ne volas, ke aliaj faru al vi,
tion vi ne faru al la aliaj.

Tio estas la tuta Instruo.

Ĉio alia estas komentarioj.

Nun iru kaj studu ĝin.

Hilel (Talmudo, Ĥabat 31)

Oni ne povas forpeli la mallumon
per bastonegoj kaj armiloj.

La sola maniero estas ekbruligi kandelon,
kaj la mallumo meme foriĝas.

Nia kandelo estas la Instruo.

Ŝofec Ŝaim

Feliĉa estas tiu, kiu kaŭzas bonan faron
ĉar li havas same grandan meriton je tio,
kiel se li mem estus ĝin farinta.

Tiu, kies bonaj faroj superas
lian saĝon
estas kiel arbo kun malmultaj branĉoj
sed kun multaj radikoj.

Eĉ ventego ne povas ekskui ĝin.

Ne la studado estas la ĉefafero,
sed la farado.

La Instruon oni povas kompari al du vojoj:
la unua el fajro,
la dua el glacio.

Iru sur la unua kaj vi pereos pro varmego.

Iru sur la dua kaj vi frostiĝos.

Kiun elekti?

Iru inter ili.

Talmudo, Hagiga 2:1

La Instruon oni povas interpreti
laŭ 49 diversaj manieroj,
kaj Dio ordonis Moseon
obei la plejmulton.

Talmudo, J. Sanhedrin 4:2

Sur tri aĵoj la mondo kuŝas:
sur la Instruo
sur la diservo
sur amofaroj.

Simon la Justulo (La prapatraj sentencoj 1:2)

Sur tri aĵoj la mondo kuŝas:
sur vero
sur justeco
sur paco.

Simon ben Gamliel (La prapatraj sentencoj)

Estu zorgemaj kiam vi juĝas,
eduku multaj disĉiplojn
kaj konstruu barilon ĉirkaŭ la Instruo.

La prapatraj sentencoj 1:1

La tradicio estas barilo
ĉirkaŭ la Instruo.

Rabi Akiva (La prapatraj sentencoj 3:17)

Ne faru la barilon pli valora
ol la ĉirkaŭbarota.

Midraŝ, Genesis raba 19:3

Domo atestas pri la konstruinto,
vesto pri la teksinto,
pordo pri la ĉarpentisto.

Nia mondo per sia nura ekzistado atestas
pri la kreinto — Dio.

Laŭ rabi Akiva (Midraŝ, Temura 3)

Kiel mano antaŭ la okuloj
povas kaŝi montegon,
la tervivo malebligas al ni
vidi la veran lumradiadon del' universo.

Nahman el Braclav

Preĝante,
mi preĝas rapide,
ĉar parolas al Dio mi.
Studante (la Instruon),
mi legas malrapide,
ĉar parolas al mi Dio.

La universo estas ĉiam nefinita &
ĝi postulas nian ĉiaman laboron
kaj nian senĉesan inventemon
ĉar ni estas la kunkreantaĵoj de la kreinto.

Simĥa Bunim

Ne sufiĉas admoni homon
pliboniĝi.
Ankaŭ helpu lin.

Korecer rabi

Kiel la marteolo povas
dispecigi la rokon,
ero el la Skribo
povas eligi multajn signifojn.

Talmudo, Sanhedrin 34a

Dio sin kaŝas antaŭ nia racio
sed aperas antaŭ nia koro.

Laŭ Sohar

Ĉio estas en la potenco de Dio
— krom la pieco.

Talmudo, Beraĥot 32b

Se homo havas du bovinojn,
fortan kaj malfortan,
li metas la jugon sur la fortan.
Same Dio faras al la justuloj.

Midraŝ, Genesis Raba 32:3

Kiam ni staros antaŭ Dio
li ne demandos:
Ĉu vi kredis je Dio
sed
Ĉu vi traktis vian kunulon
juste?

Laŭ Talmudo, Ĥabat 3a

Dio kreis ĉion — krom falsecon.

La mondo por ni estas nova ĉiun matenon.
Estas Dia dono.
Tial la homo konsideru sin
renaskita ĉiun tagon.

Bal Ĥem Tov



SAĜO KAJ MALSĜO

Malsaĝulo diras la sciatan.

Saĝulo scias la diratan.

Tute malsaĝa
estas pli bone ol
duone saĝa.

Dum horo malsaĝulo povas fari
pli multajn demandojn,
ol dek saĝuloj povas respondi
dum jaro.

Saĝa estas tiu, kiu serĉas saĝon.
Ne tiu, kiu kredas ke li trovis ĝin.

Ibn Gabirol

La komenco de saĝo
estas deziro pri saĝo

Ibn Gabirol

Estu saĝa
respektu la sperton
konkeru la veron kaj
estimu la sinserecon.

Brah̄ja Hanakdan

La kunestado kun saĝuloj estas pli signifa
ol la nura lernado.

Se al vi mankas kompreno,
kion vi do havas?
Se vi havas komprenon,
kio do al vi mankas?

Sen scio — nenia sperto.
Sen sperto — nenia scio.
Laŭ la prapatraj sentencoj

Silento estas barilo kiu ĉirkaŭas saĝon.
Nur silento ne estas saĝo.

Multe mi lernis de miaj instruistoj
pli multe de miaj kolegoj,
sed plej multe de miaj lernantoj.

Talmudo, Ta'anit 7b



La batalo de l' saĝuloj pligrandigas la scion.

Ĝis mi esprimas vorton
mi estas ĝia majstro,
espriminte ĝin,
mi estas ĝia sklavo.

Laŭ Ibn Gabirol

Kelkaj saĝuloj
tiom studas,
ke ili neniam havas tempon
pripensi.

Kelkaj studintoj estas kiel azenoj:
Ili nur portas
amason da libroj.

Baĥja ibn Paduda

La plej bona instruisto

estas la homa koro.

La plej bona instruanto

estas la tempo.

La plej bona libro

estas la vivo.

La plej bona amiko

estas Dio.

Tion ni plej bone lernas

por kio nia koro preparis nin.

Talmudo, Avoda Zara 19b

Mallonga vivo kun saĝo

estas pli bona

ol longa sen ĝi.

Moses ibn Esra, Ĥirat Israel

Ĉe serĉado de scio
la unua paŝo estas silenti
la dua aŭskulti
la tria memori
la kvara agi
la kvina instrui.

Ibn Gabirol

Saĝo estas por la animo,
kiel manĝo por la korpo.

Abraham ibn Esra

Saĝo estas kiel fajro:
Malmulto lumigas,
sed multo bruligas.

Moses ibn Esra

Saĝulo aŭdas unu vorton
sed komprenas du.

Feliĉa estas tiu, kies faroj
superas lian scion.

Midraŝ, Elijahu Raba 17

Studado estas pli signifa ol faro
se ĝi kondukas al faro.

Talmudo, Megila 26

Unue lernu,
poste kreu viajn opiniojn.

Maliĉa estas nur tiu,
ĉe kiu mankas prudento.



AMO

Ami la homaron estas facile
ami la homon estas la malo.

La plej granda amago estas
ebligi al la malriĉaj
gajni siajn vivrimedojn.

Talmudo, Ĥabat 63a

Vortoj el la koro
iras al la koro.

Moses ibn Esra, Ĥirat Israel

Amo igas nin blindaj
pri mankoj,
sed malamo
pri la virto.

Moses ibn Esra, Ĥirat Israel

La amo prenas neniajn konsilojn,
kaj amantoj
ne volas iajn.

Kudriltruo ne estas tro malvasta
por du geamantoj,
sed la tuta mondo ne sufiĉas
por du malamikoj.

Ibn Babirol, Elektitaj perloj

Se vi ne povas helpi,
havu almenaŭ kompaton.

La kompatpovo
altigas la homon super la beston.

Ne ekzistas pli sola homo
ol tiu, kiu amas nur sin mem.

Abraham ibn Esra

Eble la amo estas blinda,
sed la ĵaluzo vidas tion,
kio ne ekzistas.

Ĉiu kondiĉa amo ĉesas
kiam la kondiĉo malaperas,
sed senkondiĉa amo
neniam malaperas.

La prapatraj sentencoj 5:19

Kiam la pasio brulas en vi,
memoru
ke ĝi estis donita por bonaj celoj.

Ŝasida parolmaniero

La amo igas nin
blindaj,
surdaj kaj
mutaj.





LA HOMO

Se mi zorgus ne pri mi mem,
kiu tion farus?

Se mi zorgus nur pri mi mem,
kio mi estus?

Se ne nun — kiam?

Hilel, La prapatraj sentencoj 1:14

Kiu estas saĝa?
Tiu, kiu lernas de ĉiu homo.
Kiu estas forta?
Tiu, kiu bridas sian instinkton.
Kiu estas riĉa?
Tiu, kiu estas kontenta pri sia parto.
Kiu estas glora?
Tiu, kiu gloras siajn kunulojn.

La prapatraj sentencoj 4:1

La homo estas miraklo.

Korecer rabi

La homo estas malgranda mondo.

Avot Rabi Nathan 36

Elektu al vi instruiston,
havigu al vi amikon kaj
ĉion plej bone interpretu
je ĉiu prijuĝo de homo.

Josua ben Parahja, La prapatraj sentencoj 1:6

Parolu malmulte, faru multe
kaj renkontu ĉiun homon
per amika mieno.

Ĥamaj, La prapatraj sentencoj

Esprimplena silento ofte pli bonas
ol plej granda elokvento.

Vortoj sen penso
estas kiel piedo
sen muskoloj.

Moses ibn Esra

Parolu al via proksimulo
en la lingvo, kiun li komprenas.
Ne parolu kiel libro
al la nestudinto.
Ne parolu en ĉies lingvo
al la studinto.

Sohar

La lango estas la kuriero de l' animo.

Baĥja ibn Pakuda

Nian volon obeas
ne niaj okuloj,
sed nia lango.

Sohar

Ne juĝu vian proksmiulon.
Vi ne scias kiel vi mem agus
se vi estus en lia situacio.



Se ion laŭdindan vi komencis,
tion ankaŭ finu.

Ne estas via devo
fini la verkon.
Sed vi ne havas rajton
forkuri de ĝi.


Rabi Terfon, La prapatraj sentencoj 2:21

Estu mastro de via volo
kaj sklavo de via konscienco.

Ŝasida parolmaniero

Kiu ne estas bona al si mem,
tiu ne povas esti bona al aliaj.

Dolĉaj vortoj ne varmigas,
— sed varmaj pensoj.



La homo firme tenas opiniojn,
al kiuj li al kutimiĝis
ekde la juneco.
Tio malhelpas lin
trovi la veron,
ĉar li kaptiĝas en kutimaj opinioj.

Maimonides, Gvidlibro por hezitemuloj

La estado mem de la mondo
dependas de la infanaj spiroj
en la lernejo.

Talmudo, Ĥabat 119b

Ne minacu infanon!
Punu ĝin
aŭ pardonu ĝin.

Talmudo

Oni ne havas permeson interrompi
la edukon de infanoj,
eĉ ne por rekonstrui la templon.

Talmudo, Ĥabat 119b

Kvinjara via filo estas via majstro,
dekjara via sklavo,
dekkvinjara via egalulo,
kaj post tio li estas via amiko
aŭ malamiko —
depende de eduko.

Rigardu homojn kiam ili ekkoleras,
ĉar tiam malkovriĝas iliaj veraj naturoj.

Laŭ Sohar

La homa koro
same kiel
la mara abismo,
estas
nekomprenebla.

Dio ne kreis la virinon
el la kapo de la viro
por ke li komandu ŝin,
ankaŭ ne el liaj piedoj
por ke ŝi estu lia sklavo,
sed el lia flanko
por ke ŝi estu proksima
al lia koro.

Triokaze

malkorviĝas la vera naturo de homo:
ĉe la pokalo,
ĉe la monujo kaj
dum kolero.



Le envio, la volupto kaj la gloramo
kondukas la homon for de la mondo.

Rabi Eleasar Hakapar, la prapatraj sentencoj

La karaktero estas tenata de tri aferoj:
Komerco, vino kaj parolado.

Avot Rabi Nathan 31

En via hejmurbo — via nomo.
Ekster ĝi — via vestaro.

Talmudo, Ĥabat 14b

Se vi perdas la respekton pri vi mem,
vi perdas ankaŭ la respekton de aliaj.

Simĥa Bunim



Du oreloj kaj unu lango estas donitaj
al la homo
por ke li pli multe aŭskultu ol parolu.

Ŝasdj, Ben Hemeleĥ Ve-ha-nasir

La mizero provas la amikon,
la milito la heroon,
la kolero la humilulon.

Ibn Gabirol

Estas devo diri tion,
kio estas direnda,
kaj silenti
pri la neaŭdenda.

Talmudo, Jebemot 65b

Onidirojn mi ne atingas,
onipensojn mi superas.

Moses ibn Esra

La homo manĝas por vivi.
Li ne vivas por manĝi

Abraham ibn Esra, Jesod Mora

Se vi ne povas suferi malbonon,
vi ne vivos sufiĉe longe
por ĝui bonon.



Kiu agas tro multe
ofte faras malmulte.
Ĉio troa estas malutila.

La homo ne povas vivi,
sen kredi je io nedetruenda
interne de si. Kaj la nedetruenda
kaj la kredo devas resti kaŝitaj.
Eblo esprimi tion kaŝitan
estas kredo je persona Dio.

Franz Kafka

La granda kulpo de la homo ne estas
la pekoj, kiujn li faras,
ĉar la tento estas granda
kaj lia forto la malo.
La granda kulpo de la homo estas
ke li en ĉiu momento povas fari
la malon, sed tamen nenion faras.

Rabi Bunam/Martin Buber

Kio estas la celo de nia vivo?

Kio estas la celo de la Vivo ĝenerale?

Scii la respondon al tiuj demandoj
signifas esti religia.

Vi demandas:

Ĉu sencas demandi tion ĉi?

Mi respondas:

Kiu konceptas sian
propran vivon kaj tiujn
de la kunhomoj
kiel sensencaj,
tiu estas ne nur malfeliĉa, sed apenaŭ
povas vivi.

Albert Einstein



DRASTAJ DIROJ

Proverbo sen saĝo
estas kiel korpo sen piedo.

Moses ibn Esra, Ĥirat Israel

Proverbo havas tri rekonilojn:
malmultajn vortojn,
trafan parabolon,
veran sencon.

Moses ibn Esra, Ĥirat Israel

Se vi volas ekkoni la kreinton,
studu proverbojn.

Midraŝ Sifre-Ekev

Ekkonu la proverbojn de la saĝuloj,
ĉar per ili vi lernas.

Pripensu la diratan,
ne la diranton.

Kaspi (Komento al Joreh Deah)

Nenia certo sen dubo.
Elias Levita, Tiŝbi

Eĉ ne tiuj kun grandaj okuloj
vidas siajn proprajn mankojn.

Komence la malbono estas dolĉa,
sed fine amara.

Talmudo J, Ĥabat 14:3

Edziniĝinta filino
estas kiel pangranĉaĵo
— fortranĉita.

Amo
kiel butero
plej bone gustas kun pano.

Grizaj haroj estas signo pri aĝo,
ne pri saĝo.

Riĉeco alportas ĉagrenon,
saĝeco — kvieton de l' anim'.

Ibn Gabirol

Kiu ne gustumis maldolĉan,
ne scias kio estas dolĉa.

Du aferoj malfortiĝas kun la aĝo:
dentoj kaj memorkapablo.

La tempo donas vundojn kaj sanigas vundojn.



Legi tradukitan poezion
estas kiel kisi virinon
tra vualo.

Ŝaim Naĥman Bialik

Vorto similas al la korpo,
la signifo al la animo.

Moses ibn Esra

La vero povas esti nuda,
sed la mensogo
devas esti maskita.

Vizitoj estas kiel pluvo.
Oni petas pri tio,
se mankas.
Sed tro multe
lacigas.

Ibn Gabirol

Ĝemeto povas
krevigi homon.

Talmudo, Braĥot 58b

Nur per tio, kio estas malkovrita
homo povas kompreni tion,
kio estas kovrita.

Leopolod Cunc

La lango estas pli danĝera ol la glavo,
ĉar ĝi povas vundi de malproksime.

Kion vi vidas,
tion vi ne povas prirespondi,
sed kion vi diras,
tio tute dependas de vi.

Sohar

Havi monon estas bone,
sed regi monon
estas pli bone.

Ju pli blindulo vivas,
des pli multe li vidas.

Ĥolem Aleĥem

Estu fleksebla kiel kano
kaj malmola kiel la cedro.

Talmudo, Ta'anit 20b

Pli bone estas demandi dekfoje
ol misiri unufoje.

Vortojn oni pesu — ne nombru.

Se vi estas faronta ian malĝustaĵon,
almenaŭ ĝuu tion.

Aĵego ofte dependas de aĵeto.

Tiu ĝojo, kiun donas al ni infanoj,
estas pli valora ol oro.

Se ne ekzistus malgrandaj,
ne ekzistus grandaj.

Talmudo, Sanhedrin 10

Antaŭjuĝo — la blindeco de l' cerbo.

Ankaŭ duona respondo ion diras.

Pli bone vera malamiko
ol falsa amiko.

Kandelo lumas por aliaj
sed konsumas sin mem.

Bonvenon laŭ vesto,
adiaŭ laŭ konduto.

Se vi ne volas maljuniĝi
mortpendigu vin juna.

Pli bone unu vorto ĝustatempa
ol du malĝustatempaj.

Kio sapo estas por la korpo,
larmoj estas por la animo.

La tempo aliigas ĉion.

Klaĉado — la telefono de l' natur'.

La ora tempo —
tiu tempo, kiam la oro
ne regis.

Amiko mia estas tiu, kiu atentigas min
pri miaj mankoj — private.

Ibn Gabirol

Ne zorgu pri l' morgaŭo.
Kiu scias tion,
kio povas okazi hodiaŭ?

Talmudo, Jebamot 63b

Estas serioza malsano
maltrankviliĝi pro tio,
kio ne okazis.

Ibn Gabirol

Nur unu speco de malgrankvilo
estas akceptebla:
maltrankvili ĉar oni
tro multe maltrankvilas.

Timo pri la malfeliĉo
pli aĉas, ol la malfeliĉo mem.

Kiu serĉas la veron
devas aŭskulti
ankaŭ siajn kontraŭulojn.

Isak Samuel Reggio

Ĉiu aŭtoro pripensu sian verkon
kaj demandu sin:
Ĉu ĝi estos utila
al la homaro?

Nahman el Braclav

Ankaŭ nenia respondo
estas respondo.

Miraklo ne pruvas
ke io maleblas;
ĝi nur taŭgas por konfirmi tion,
kio eblas.

Maimonides

La kutimo estas pli potenca,
ol la leĝo.

Talmudo, Jebamot 61a

Laŭdu tri aĵojn:
la kampon,
la amikon,
la libron.

Hai Gaon

Se vi perdis ĉiun vian monon,
vi perdis la duonon.
Se vi perdis la kuraĝon,
vi perdis ĉion.

Se vi tro persiste
atentigas ke vi pravas,
vi malpravas.

Prefere malbona paco
ol bona milito.

Paco estas por la homo tio,
kio la gisto estas por la pasto.

Ne malfacilas morti
kiel judo,
malfacilas vivi kiel judo.

Ŝofec Ŝaim

Judoj estas kiel ĉiuj aliaj —
nur en pli alta grado.

Patroj ĉiam provas eduki
siajn filojn esti bonaj judoj.
Kiam ili mem provos esti
bonaj judoj
kaj ne pludonos tiun taskon
al siaj filoj?

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-193-3